5-a Jaro. N-o 211 APERAS  SEMAJNE 18. Oktobro 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

TIAL MI NE POVAS KREDI JE DIO

Mi ne povas malhelpi, ke mi restas timigita antaŭ la tromemfido de tiuj el miaj samspeculoj, kiuj kredas je iu dio, pri kiu oni povas paroli kiel pri homo. Kiam mi rigardas la stelojn, kaj dum mi pensas pri la humileco de nia terglobo, sur kiu la homo mem estas tiel malgranda, mi sentas min plena da doloriga modesteco, kaj mi ne arogas al mi, kvankam tio estas oportuna por la lingvo, pensi ke iu, kiu havas la samajn ecojn kiel mi, faris ĉion tion. Mi vidas cetere kun plezuro, ke miaj fratoj-kreduloj samopinias kiel mi je ia vidpunkto; ili rifuzas por la formikoj[1], kiuj estas tro malgrandaj (!), eĉ la percepton pri dio; ilia animo ne estas farita laŭ la bildo de dio, malgraŭ la admirinda aranĝo de iliaj socioj, sed por la homo nenio estas tro bona!

Oni respondos al mi, ke mi mem estas senfine fierega rifuzante konsenti pri la evidenteco, per kiu la misteroj de la naturo impone forlogas la plej nekredemajn. Ne estas mia kulpo, se tiu ĉi evidenteco ne krevigas al mi la okulojn; kaj mi asertas, ke mi estas male tre humila kaj tre modesta, en mia certeco esti nenio, sed oni ne kredos al mi.

Kio rilatas la misterojn, la mondo estas plena da ili; mi povus citi grandan nombron, rigardante kiujn la kredo al homeca dio havus por mi nenian utilon. Oni diras al mi ekzemple, ke la varmo estas ŝuldata al movo de tre malgrandaj korpetoj. Mi estas tute inklina kredi ĝin, sed mi demandas min kun maltrankvilo, kiel povas esti tiuj ĉi korpetoj, kies movo produktas la varmon; ili estas nek varmaj nek malvarmaj. Provu imagi korpon, kiu ne havas temperaturon; mi spitas vin en tio. Mi tiras min el la embaraso, dirante al mi, ke mi konas nur la aferojn de mia formato; mi ne povas koni tion, kio estas tro malgranda; mi konsolas min do ne koni tion, kio estas tro granda, kiel estus la dio, je kiu vi kredas.

* * *

Mi supozu, ke mi povus kredi, kontraŭ mia naturo kaj kontraŭ mia racio, je la ekzisto de iu dio, pri kiu oni povus paroli kiel pri homo ĉiopova (sed estas vere, ke mi nenion sciencan povas diri lokante min en hipotezon tiel malproksiman de mia reala stato; mi ne kredas je dio kaj, se mi kredus je li, mi estus diferenca de tio, kio mi estas). Se mi eĉ supozus, mi diras, ke mi povus kredi je iu persona dio, ne ŝajnas al mi, ke mi havus por li la sentojn de adoro kaj dankemo, kiujn oni postulas de veraj kreduloj; mi dirus al mi, ke li kreis min por sia propra plezuro, ke li ŝarĝis min per servo, pri kiu mi ne petis lin kaj kiun, tute sincere, mi bone estus malbezoninta, kvankam mia vivo ĝustadire estis feliĉa ĝis hodiaŭ. Kiam mi aŭdas rakonti al infanoj prifeajn fabelojn, mi ofte diras al mi, ke mi ne estus hezitinta, se bona feino prezentus al mi realigi unu el miaj deziroj; mi estus dezirinta "neniam esti ekzistinta". Cetere, se mi bone komprenis, tion elpetis Hiobo, kiam li estis en mizerego[1]. Sed kredulo, kiu atendas la eternan vivon, ne rezonas kiel ateisto, kiu kalkulas sole kelkajn jarojn da malboneta vivo; ateisto do ne povas scii, kion li farus, se li estus kredulo. Mi imagu sole, ke se mi estus kredulo kaj daŭrigus pensi kiel mi pensas nun, mi verŝajne havus la saman opinion kiel maljuna sinjorino, kiun mi konis dum mia infaneco, kaj kiu diris tute mallaŭte, kvazaŭ kaŝeme: "Mi ne amas la bonan dion, sed mi timas lin!" Ĉu ne estas tiu ĉi sento de timo, kiun volis estigi ĉe siaj aŭskultantoj, post la bruligado de l' Bonfar-bazaro, la fama dominikano Olivie' (france: Ollivier)? Nu, la timo, ŝajnas al mi, tre malbone akordiĝas kun la amo.

Mi ne estas heroa denature; se mi kredus, ke absoluta majstro povus konsenti al mi eternan feliĉon aŭ kondamni min je senfinaj punoj, mi verŝajne evitus, en monaĥejo, la danĝerojn de l' jarcento; mi pasigus mian mizeran vivon sublunan kantante la gloron de l' despoto, de kiu dependus mia estonto. Estas ankoraŭ konsekvenco de mia ennaskita ateismo ne partopreni la admiron de l' kreduloj por tiuj, kiuj solvis tiel la problemon de la vivo. La pastroj mem deklaras, ŝajnas, ke la monaĥa stato estas la stato plej perfekta. Miaparte, mi ne admiras la monaĥojn; mi ilin ankaŭ ne malestimas, ĉar mi estas certa, ke mi farus kiel ili, se mi estus kredulo; mi ne povas malestimi homon, kion ajn li faris; mi sentas min tro simila al li kaj tro kapabla imiti lin.

El "L'Athéisme" (La Ateismo) de F. Le Dantec trad. N. B.

[1] Kaj eĉ por la elefanto, kiu estas pli granda ol ni.

[1] "Malbenita estu la tago de mia naskiĝo!"

KONFLIKTO EN JUGOSLAVIO

Balkano, kiu dum lastaj jardekoj estis konstanta kaŭzo de militaj konfliktoj, lasttempe denove vigle interesas la mondon. Nuntempe temas pri la interna konflikto inter la unuopaj nacioj, aŭ pli bone dirite inter la ŝovinista reganta klaso en Serbio kaj aliaj nacioj en Jugoslavio. Ĉar balkana politiko ne estas tre bone konata al la mondo, necesas ĝin prezenti iom pli detale. Ni reiru iomete en la pasintajn jarojn.

La fino de la mondmilito havis kiel sekvon kreon de kelkaj novaj ŝtatoj en Eŭropo. Sur Balkano estas post disfalo de aŭstrohungara monarkio kreita nova ŝtato la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj aŭ ĝenerale nomata Jugoslavio. La 1-an de decembro 1918 aliĝis al Serbio la regionoj defalintaj de aŭstro-hungara monarkio t. e. provincoj: Slovenio, Dalmacio kaj Bosnio (estintaj antaŭe sub la regado de aŭstrianoj) kaj Kroatio (estinta kelkrilate memstara kun propra parlamento en Zagreb, kaj kelkrilate ĝi havis komunajn aferojn kun Hungario, Montenegro (iama sendependa reĝlando) kaj la regionoj estintaj sub regado de Hungario t. n. Vojvodina. Tiele aliĝinte libervole al Serbio estis el ĉiuj ĉi provincoj kreita Jugoslavio kaj la serba reĝo akceptita kiel reĝo de la nova ŝtato.

La esperoj, kiujn oni havis pri tiu nova ŝtato ne realiĝis. Tre evidenta diferenco de la kultura kaj ekonomia niveloj de la regionoj estintaj sub regado de aŭstro-hungara monarkio kaj Serbio ĉiutage pli kaj pli evidentiĝis. Serboj, popolo alkutimigita je militado, ne havas grandajn postulojn dum paca tempo je pli bona vivo, je plibonigo ekonomia kaj kultura. Iliaj politikaj partioj estas samtiaj. La ministroj kaj deputitoj estas homoj koruptplenaj, ŝovinistoj, kiuj nutras sian popolon per naciecaj frazoj pri "Grand-Serbio". Verŝajne en la tuta mondo ne ekzistas ŝtato kie korupto tiel floras kiel en Jugoslavio.

La centralisma konstitucio, akceptita kontraŭ la volo de kroatoj kaj slovenoj, ebligas al serbaj ministroj liberan ekspluatadon de la tuta ŝtato, ĉar ĉiuj enspezoj kolektiĝas en la centro de korupto, la ĉefurbo Beograd famega pro sia malliberejo "Glavnjaĉa".

Necesas klarigi kiel estas eble ke serboj havas en la parlamento plimulton. La leĝo pri elekto en parlamenton ebligas al serboj plimulton; ĉar ĝi estas diferenca por Serbio kaj la aliaj regionoj. En Serbio la elekto estas farata baze de la popolnombrado antaŭ la balkana milito. En aliaj regionoj ĝi estas farata baze de plej nova popolnombrado. Signifas do, ke en Serbio decidas ankaŭ mortintoj. Kiom ajn ridinda estas tiu ĉi aserto, tamen ĝi estas vera. La tuta ŝtato estas dividita je distriktoj kiuj elektas deputitojn. La distriktoj estas faritaj laŭ la nombro de l' popolo. Do, en Serbio laŭ la nombro antaŭ balkanaj militoj kaj en aliaj regionoj laŭ la nombro plej novdata. Ekz. en Serbio necesas por elekti parlamentanon maks. 6000 voĉoj kaj en aliaj regionoj 12—14 miloj. Tiel la serboj havas plimulton en la parlamento. Krome la ĝendarmoj kaj la tuta polica aparato, ĉiam ĉe la elektado per batoj "influas" la volon de la popolo. Kiu ne voĉdonas por serbaj ŝovinistoj, tiu estas arestata, bategata, ofte eĉ mortigata. La suda Makedonio estas plej bona pruvo por tio.

La unua, kiu klare vidis la situacion kaj kiu komprenis, ke kun serbaj ŝovinistoj ne estas ebla kunlaboro baze de centralisma konstitucio, estis en parlamento vundita kaj poste mortinta gvidanto de l' kroata kamparana partio Stefano Radiĉ. Dum kelkjara foresto el parlamento li serĉis komprenon inter la gvidantoj de eŭropaj politikistoj por sia tezo, sed li ne sukcesis en tio. Fine li estis devigita laŭ konsilo de eŭropaj "saĝuloj-politikistoj" iri en parlamenton kaj tie partopreni la laborojn. La parlamentlaboro, la partopreno en la registaro, ankoraŭ pli bone pruvis al kroatoj, la neeblecon, kunlabori en la parlamento kun la serbaj naciistoj kaj koruptuloj. Serbaj deputitoj, kiom ajn oni akuzis antaŭ la parlamento iliajn ministrojn pro evidenta korupto, ĉiam rifuzis transdoni tiujn lastajn al juĝistoj. Agante tiel, oni kreis pli grandan certecon por ŝtelado kaj la korupto floregis. Intertempe la streĉiteco kreskis.

Post pasintjaraj elektoj du serbaj partioj, la radikala kaj demokrata, kreis helpe de slovena klerikala partio kaj jugoslava mahometana partio t. n. "koalicion", kiu prenis la regadon de la ŝtato en siajn manojn. En la opozicio restis kroata vilaĝana partio sub gvidado de Stefano Radiĉ kaj sendependa demokrata partio reprezentanta serbojn el la regionoj de iama aŭstrohungara monarkio. Estas en la opozicio ankoraŭ kelkaj aliaj grupetoj kaj unuopuloj ne tre signifaj. La kroata vilaĝana partio kaj Sendependa demokrata partio formis pasintan aŭtunon vilaĝano-demokratan koalicion, kiu en la parlamento ludis gravan rolon farante al la registaro konsistanta ĉefe el serbaj radikala kaj demokrata partioj opozicion.

La problemoj starantaj je la tagordo de la parlamento devigis la opozicion apliki plej grandan obstrukcion[1] por malebligi, ke la proponataj leĝoj de la registaro povu esti akceptataj en la parlamento. Inter la problemoj estis la plej gravaj jenaj: Leĝigo de la Nettunaj[2] konvencioj, prunto el eksterlando sumiĝanta je miliardoj da dinaroj kaj la leĝo pri la impostoj, kiuj ankoraŭ ne estus egaligitaj. Konata estas la afero, ke de la leĝigo de Nettunaj konvencioj dependis la ricevo de la prunto el eksterlando. Samtiel konata afero estas, ke la regantoj estus ricevintaj kelkcent milionojn kiel makleraĵon de tiu prunto. Krome la kondiĉoj, sub kiuj la registaro volis akcepti la prunton, estis tiom skandalaj, ke la opozicio estis devigata plej energie kontraŭbatali la akcepton de tia prunto. Oni volis doni kiel garantion por repago ekz. la enspezojn de monopolo, fervojo ktp. La prunto cetere estus uzata plej grandparte por aĉeto de armiloj, por konstruo de fervoja linio respondanta ne al la bezono de l' popolo, sed al la bezono de militistoj. Mallonge dirite, la prunto estus foruzita ne je la bono de l' popolo, sed je la bono de l' registaro.

La postulo de la opozicio egaligi en la tuta ŝtato la impostojn trovis ĉe la registaro plej energian kontraŭstaron, ĉar efektivigi la egaligon de la impostoj signifus por serbaj partioj perei inter la malriĉega loĝantaro de Serbio. Do, la novaj regionoj estis ekspluatataj ĉiupaŝe. Ankaŭ la nova prunto estus kuŝinta sur la dorso de la popolo el la novaj regionoj, dum la loĝantaro de Serbio ne estus tre sentinta tiun ŝarĝon. Tia estis la situacio en la ŝtato kaj en parlamento ĝis la 20-a de junio 1928.

En la kunsido de l' parlamento tiun tagon la opozicio per transdonado de urĝaj proponoj malebligis al la registaro la laboron. Cetere flanke de la registaro kaj de ĝiaj grupoj preskaŭ neniu partoprenis la laborojn de la parlamento, sed kiam estis necese voĉdoni, oni per aŭtomobiloj kolektadis en Beogrado la deputitojn de la registaraj partioj. Kiam la voĉdonado finiĝis, la deputitoj denove disiris. La kunsido mem ne estis tre streĉita. Eĉ oni povus diri, ke ĝi estis — kompare kun la antaŭaj — sufiĉe trankvila. Jam de post kelka tempo antaŭ la 20-a de junio aperadis en Beogrado unu fi-gazeto laŭdire subtenata de ĉefministro Vukiĉeviĉ, en kiu gazeto la redaktoro publike deklaris, ke oni devus mortigi la gvidantojn de la opozicio Radiĉ kaj Pribiĉeviĉ. En tia atmosfero venis la fatala tago, kiam en la dirita parlamentkunsido la deputito de l' serba radikala partio Puniŝa Raĉiĉ faris atencon kontraŭ la gvidantoj de l' opozicio. La atencinto pafis tute trankvile 6-foje el revolvero. Mortis tuj en la parlamento la deputitoj de l' kroata vilaĝana partio Pavle Radiĉ, la nevo de la gvidanto Stefano Radiĉ kaj Ĝuro Basariĉek. Tri aliaj, inter ili Stefano Radiĉ, estis grave vundataj. La kunsido estis kompreneble

[1] Malhelpo de parlamentaj interkonsiliĝoj.

[2] Sen-taraj.

Iom pri la kooperativa movado en Svedio

(Daŭrigo)

La produktprogramo de K. F.

La origina penso, kiu estas la kaŭzo de la enmiksiĝoj en la industrioj, estadas intenco haltigi aŭ interrompi troaltigon de prezoj. Multaj el la industriistoj konas tiun principon de K. F. kaj tial atentas pri sia prezpolitiko. La nura ekzisto de K. F. do sekvigas utilojn, kiujn profitas ĉiuj konsumantoj, ĉu organizitaj kooperativanoj aŭ ne. La gvido de K. F. laboras laŭ ok direktivpunktoj, kiuj eble interesas la legantojn:

1. La industrio de K. F. estu financigata per la propra ekonomio de la kooperativa movado.
2. Estas pli bone ĝisplue deteni sin de industria intermiksiĝo ol pro tio esti ŝuldanto al eksterstaranto.
3. K. F. ne devas sin dediĉi al tiaj industrioj, kiuj pro sia bona stato estas dependaj de la ŝirmo de imposto.
4. Tiu cirkonstanco, ke K. F. vendas varspecon en sufiĉa amplekso por povi mem produkti ĝin, ne estas certa kialo por ekstarigo de propra industria entrepreno.
5. K. F. prefere komencu produkti nur en tiaj industrioj, kie la kooperativa movado havas eblon starigi entrepenon, kiu estos tute konkurforta kaj teknike tute unuaklasa, inter la plej eminentaj en la lando. Resume: La industrio de K. F. devas ĉiam esti teknike unuaklasa.
6. K. F. devas rilate al sia industria evoluo kolekti ĉiujn fortojn por solvi u n u g r a n d a n p r o b l e m o n. Nur tiel la kuniĝo en la movado kaj la fideleco al ĝi estas konservata. Estas pli bone, ke K. F. administru u n u entreprenon tiel, ke la asocio en tiu branĉo superas la privatajn entreprenojn ol ke K. F. en multaj branĉoj konkuru kontraŭ privatbranĉoj konkuru kontraŭ privatuloj.
7. K. F. prefere produktu nur tiajn varspecojn, kiuj ĝenerale estas konsumataj en la membrorondoj, kaj kiuj ludas gravan rolon en la mastrumado de la membroj.
8. K. F. prefere per siaj industriaj entreprenoj produktu nur kelkajn varspecojn por amaso da membroj ol amason da varspecoj por malmultaj membroj.

La kas- kaj librotenada sekcio

En la antaŭe aperintaj artikoloj ni ekkonis la vardistribuadon kaj produktadon, kaj tial estas bone ankaŭ konatiĝi kun la financa flanko kaj ankaŭ la agobranĉoj, kiuj estas sub la gvido de la financa ministro de K. F.

La vendado de K. F. en 1927 estis 120 milionoj da kronoj. La plej multaj el la industriaj entreprenoj estas organizitaj kiel memstaraj akciaj societoj, en kiuj tamen la tuta akcia stoko[1] apartenas al K. F. Tion oni faris pro oportunaj kaŭzoj. Por havi "ĝeneralan bilancon", t. e. bildo de K. F. se la subentreprenoj ekzistus, estas necese kunkalkuli la diversajn entreprenojn kaj K. F. mem. Tiu koncentrigita bilanca bildo do estas la 31. 12. 1927:

Aktivoj:	milionoj da kronoj	Pasivoj:	milionoj da kronoj
Kaso, je banko, obligacioj . . .	26.1	Ŝparkaso	42.2
Pretendoj	5.7	Varŝuldoj	6.0
Hipotekŝarĝoj .	8.2	Pruntoj	0.8
Varprovizoj . . .	16.6	La industria fondo	7.5
Maŝinoj kaj objektaro	2.9	Ceteraj fremdaj ŝuldoj	1.1
Terhavaĵoj senŝarĝaj	14.7	Propra kapitalo	15.1
Interesoj en aliaj entreprenoj . .	1.5	Plus-saldo	3.0
	mil. kr. 75.7		mil. kr. 75.7

Nura rigardo je tiu forte skema bilanco donas al ni imagon pri signifa ŝparkasa agado de la K. F. La tri unuaj punktoj en la aktivoj diras al ni, kiel oni disponis la ŝparmonon. Ili ja forte pruvas, ke la monflueco estas bonega. La situacio estas tia, ke K. F. povus redoni ĉiun monon el la ŝparkaso kaj tamen agadi senhalte kun sia ordinara agforto. La kooperativa vardistribuado kaj industrio do n e estas dependaj de la ŝparkasa agado.

En la plej multaj konsumsocietoj la membroj povas lasi aŭ depreni sian monon. Tiuj societoj tamen estas nur kolektejoj de la ŝparmono. Estas K. F. kaj ne la lokaj societoj, kiuj prizorgas la ŝparkasan movadon. La societoj ne faras ion alian ol akcepti aŭ elpagi la monon por K. F. kaj doni raporton simplan pri tia faro. Pri la industria fondo oni eble demandas, kial ĝi ne estas enkalkulita en propra kapitalo. La respondo estas, ke la industria fondo ne estas vera fondo, sed konforma je obligacia pruntepreno. La nomo klarigas, por kio la mono estas uzata. Ĝi celas pluan evoluigon de la industrio de K. F.

[1] deponaĵo.

K. F. kaj la bankoj

Mi tuŝis ĉi-supre, ke K. F. faras bankan servon al la apartaj membroj de la societoj. K. F. plenumas ankaŭ saman taskon por la mono, kiun la societoj disponas. La societoj nome ordinare ne havas proprajn kontojn ĉe la bankoj. Ili ja lasas sian monon, la tagkason ĉe ia bankkontoro en la koncerna loko, tamen ne je propra sed je la konto de K. F. Tia faro koncentrigas la monon en la manon de K. F. kaj ebligas al K. F. siavice lasi ilin en tia maniero, ke marĝeno (? Red.) estiĝas inter en- kaj eldonaj rentumoj.

K. F. rentumas tute laŭ banka maniero la monon de la societoj kaj postulas siavice ankaŭ rentumon je la ŝuldoj de la societoj al K. F. La rentumlibera tempo, kiun K. F. permesas al la societoj, estas tridek tagoj. En la lasta kongreso tamen estis decidite, ke la societoj aranĝu sian agadon tiele, ke ili ne bezonu pli longan krediton ol por dek tagoj.

La ĵus dirita koncentrigo de la "mova" mono supozas, ke la societoj ankaŭ havu eblecon senhalte povi ricevi monon je sia konto ĉe K. F. Tiu afero estas aranĝita tiel ke la societoj rajtas en sia loka banka kontoro ricevi ĉekon je la konto de K. F., kaj per tiuj ĉekoj pagi ankaŭ al aliaj liverantoj ol K. F. Tiu ĉi sistemo montriĝis tre praktika por ĉiuj. Ĝi estas tre malmultekosta, sed, ĝi postulas, ke K. F. havu intiman konon pri la ekonomia stato de la societoj, kaj ankaŭ ke K. F. povu fidi je tio, ke la societoj ne troŝarĝu la bankkontojn de K. F. Tiu kono kaj tiu fido dank' al la revizia sistemo de K. F. estas tre granda.

John Johansson.

(Daŭrigota.)

---

interrompita, la atencinto trankvile foriris. Du aliaj serbaj deputitoj Dragutin Jovanoviĉ, de serba demokrata partio, kaj Toma Popoviĉ de serba radikala partio, tuj post la atenco en la parlamento mem deklaris, ke la atencinto bone faris mortiginte la deputitojn kaj se li ne estus tion farinta, estus ĝin farintaj ili. La vunditajn deputitojn oni transportis en malsanulejon kaj operaciis ilin.

. . . a . . . v . . . o (Finota).

NOVA SAT-ELDONAĴO!

FABELOJ de Hermynia Zur Mühlen

Kion rakontas la amikoj de Peĉjo

Tradukis Senheredigito

Ĵus aperis tiu ĉi bela legaĵo, kiu plezurigos la plenkreskajn K-dojn kiel la etulojn, en la "Biblioteko de Sennaciulo". Ĝi estos unu el la plej ŝatataj verketoj. kiuj havigos al si multajn amikojn inter la SAT-Legantaro. Tre taŭga ankaŭ por komuna legado dum viaj kunvenoj.

Tuj mendu ĉe

Administrejo de SAT, R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

Prezo 0,60 gmk.

RAPORTARO

de la 1-a SAT-Konferenco en Göteborg 19. aŭgusto 1928

2. **Laborista Vetur-Asocio** (Transport House, Smith Square, London SW. 1)

La brita Laborista Vetur-Asocio (laŭ angla mallongigo W.T.A.) fondiĝis en 1921. La fondintoj konsistis el grupo da homoj aktivaj en la laborista movado, kiuj kredis, ke interŝanĝo de vizitoj inter diverslandaj laboristoj plej bone helpus al amikeco internacia kaj multe plilarĝigus la vidpunkton de la partoprenintoj. Tial ĝi ĉefe estas organizo, por antaŭenpuŝi veturadon kaj libertempadon en aliaj landoj por laboristoj. Inter vetur-asocioj ĝi havas unikan lokon, ĉar ĝi penas starigi personan kaj individuan kontakton inter la laboristoj vizitantaj kaj vizitataj. Ĝiaj prezoj por libertempoj kaj rondvojaĝoj estas kiom eble plej malaltaj, sin limigante je la necesaj elspezoj. Samtempe ĝi estas praktika komerca entrepreno, kiu provizas peradon por ĉiu fako de veturo tra lando, maro aŭ aero. Nun ĝi estas agento por la ĉefaj britaj kaj eŭropaj fervojoj, ŝip- kaj aeroplan-kompanioj. Politike sendependa kaj finance memstara, ĝi estas kunligata kun la brita laborista kaj sindikata movadoj per sia Ekzekutiva Komitato, kiu reprezentas ĉiun fakon de nacia kaj internacia laborista agado en Granda Britio. Komence la Asocio ĉefe aranĝis libertempojn por britaj laboristoj en aliaj landoj, sed pli kaj pli ĝin nun helpas alilandajn laboristojn viziti Brition. Dum somero de 1926, 110 anoj de la "Bildungsausschuss der Arbeiter" (Kleriga komitato laborista) de Bern kaj grupo el Danio rondvojaĝis. Ni kune laboris kun similaj asocioj en Belgio, Aŭstrio, Holando, Germanio, Svisio, Svedio, Danio kaj Usono.

Nun la Asocio posedas gastdomojn en diversaj landoj, ankaŭ en Britio, kaj povas akcepti alilandajn vizitantojn individue aŭ grupe. Speciale ĝi substrekas kontakton kun laboristaj organizoj kaj vizitoj al Labora, Kooperativa kaj Edukadaj institucioj. Tiu ĉi jaro la Asocio entreprenas veturaranĝojn por pli ol 15 000 personoj. La ĉefoficejo estas bona centro por alilandaj vizitantoj kaj la sindikatoj, delegitaroj politikaj ktp. nun regule uzas la servon de la W. T. A. Jam la Asocio organizis Internacian Konferencon pri Laborist-veturado kaj nun ĝi funkcias por la aliaj asocioj kiel inform-interŝanĝejo. Kvarfoje dum la jaro aperis la oficiala organo *Travel Log* (Vetur-Taglibro), kaj ĝi lastatempe interesiĝas pri la internacia lingvo. Dumvintre la Asocio organizas lekciojn, sociajn kunvenojn, lingvajn kursojn ktp. por helpi en la edukad-influo de veturado.

3. La Nacia Konsilantaro de Laborist-Kolegioj

Ĝia agado kaj taskaro estas jam plene priskribitaj en *Sennacieca Revuo* (aŭg. 1925 kaj junio 1926). Tial nur mallonga resumo necesas ĉi tie. Ĝi estas federacio de kolegioj en la diversaj urboj kaj distriktoj, kiu provizas ĉefe la sindikatanojn per kursoj en la sociaj sciencoj — historio de socio, ekonomio, historio de la sindikatoj ktp. Tute sendependa de la ŝtato kaj burĝa financa helpo, ĝi povas krei veran laboristan kulturon. Bazita sur rekono de la fakto de l' klasbarakto, la N. K. L. K. senkaŝe helpas eduki la laboristaron por renversi la kapitalismon. Jen statistiko pri kursoj kaj studantoj. La falo en la lasta jaro okazis, ĉar la kursoj estis pli longaj kaj pro la ĝenerala apatio.

	Kursoj	Studantoj	Tutbrit. sindik. kun oficiala edukadskemo
1924/25	1048	25 071	28
1925/26	1234	30 398	35
1926/27	1201	31 635	32
1927/28	1102	27 147	31

The Plebs (La Plebo), ĝia ĉiumonata revuo kun eldonkvanto de 6000 ekz., subtenas depost 1921 esperanton. — Studo per korespondado por individuaj laboristoj estas grava fako en ĝia laboro. Korespond-kursanoj estis: 1923/24: 90; 1924/25: 645; 1925/26: 1459; 1926/27: 2702; 1927/28: 2385 (el tiu lasta cifero 254 esp. kursanoj, 893 angla lingvo. Aliajn lingvojn la N. K. L. K. ne instruas).

Financo. La tuta centra enspezo: 8410—15—4. El tio £ 6187 estis pagataj de sindikatoj al la centro.

La N. K. L. K. eldonas multajn lernolibrojn, kaj ili estas tradukataj por uzado en laborist-edukado alilanda. Ĝia "Skizo de Ekonomia Geografio" esperEble aperos inter la SAT-eldonaĵoj. Por havi kontakton inter alilandaj K-doj, la N. K. L. K. organizis specialajn somerlernejojn en Francio (1925), en Belgio (1928). Ĉe la Internacia Konferenco por Laborista Edukado organizita de la Amsterdama Sindikataro en Oksford, ĝi proponis la alprenon de esperanto kaj certe ŝatus interrilati kun alilandaj organizoj por lab. kulturo.

LA KOMUNUMO JE NOMO DE ROZA LUKSEMBURG

Post longa jaro da laboro (mi gvidas la funkcion de granda publika biblioteko) mi fine ricevas monatan forpermeson kaj veturas por ripozi al miaj edzo kaj filo en suprenomitan komunumon, kie la unua laboras kiel agronomo kaj la dua — 3-jara Ribelul' estas edukata en tiea infanvartejo.

Do: cent kilometrojn norde de Saratov, en estinta bieno de grafo Ŝeremetjev, antaŭ dek jaroj estis organizata komunumo je nomo de R. Luksemburg. Ĝiaj fondintoj estis kelkaj laboristoj, lasintaj siajn estingiĝintajn fabrikojn kaj forkurintaj el malsataj gubernioj. Furiozis la milito, kaj la jaroj sekvis unu la alian, malfacilaj kiel inkubsonĝo kaj malkvietaj kiel monta torento. Sekve la tiama komunum-anaro ne tre zorgis la plibonigon de agrikultura mastrumado: ja ĉies zorgo de tiama epoko estis — iele ekzisti kaj ne morti pro malsato.

Kiam do finiĝis la milito kaj larĝega rivero de revolucio eniris sian kvietan akvujon, kiam fabrikaj fajfiloj unu post alia sciigis pri la kolektiĝo al fronto de laboro — tiam, fidelaj al siaj laborejoj, formilitigitaj de siaj antaŭaj mastroj, la laboristoj grandamase komencis forlasi la komunumon. La tie restintaj, plejparte kamparanoj, starigis kiel sian ĉefan taskon — plibonigon de agrikultura mastrumado en la komunumo. Kaj malgraŭ diversaj malhelpaĵoj ĝi ekzistas, kreskas, ĉiam disvolvante sian laborkapablon.

En la nuna momento la komunumo konsistas el 120 homoj; al tiu sumo apartenas ankaŭ gemaljunuloj kaj infanaro, kiuj ne povas labori, sed la komunumo prenis sur sin ilian prizorgon. Tamen laboras preskaŭ ĉiuj, ĉar al tiu cirkonstanco multe helpas la en tiu ĉi jaro enkondukita sistemo de pripagata laboro. La viro por okhora labora tago ricevas 50 kopekojn, la virino 40, la infanaro por 4-hora labortago 30 kop. Poste, en jarfino, kiam estas realigata la rikolto, ĉiu ano de l' komunumo, proporcie al la enspezita sumo dum tuta jaro, ricevas alpagon, tielnomatan provizan fonton. La familioj de l' komunumanoj loĝas en apartaj, sufiĉe komfortaj kaj vastaj loĝejoj. Ĉio estas komuna, escepte de la kokinoj, kiujn ĉiu mastrino nepre havas.

La komunumo disponas pri 550 hektaroj da tero, el kiuj en tiu ĉi jaro estas prisemitaj 170 hektaroj. Estas enkondukita herbsemado kaj kvarkampa rotacio. En estonta jaro laŭ plano ĝi havos jam 200 hektarojn da kulturita tero de selekciaj[1] semoj. La komunumo havas muelejon, diversajn maŝinriparejojn, en kiuj oni riparas eĉ ford-maŝinojn[2], ne nur proprajn, sed ankaŭ por la ĉirkaŭa loĝantaro. Krome, estas tie elektrostacio, radio kaj du ford-maŝinoj; kion certe la estinta posedinto de ĉi tiu bieno — grafo Ŝeremetjev — ne havis. La anoj de l' komunumo vivas multe pli bone ol kamparanoj. Precipe vi povus tion konkludi, observante la infanaron, kiu tre diferencas de tiu de l' ĉirkaŭa kamparanaro. Ili aspektas tre sane kaj vigle, kun puraj, gajaj vizaĝetoj, orde vestitaj, kun ruĝaj kravatoj sur koloj.

[1] Bonspecaj.
[2] Maŝinoj nomitaj laŭ sia usona produktanto, la grandindustriisto Ford.

DU TAGOJ EL VIVO DE BURĜ-ARMEANO

Ruĝfratoj, ruĝarmeanoj! Precipe al vi estas dediĉata tiu ĉi artikolo. En antaŭaj n-oj de "S-ulo" vi detale priskribis vian ĉiutagan vivon; do estas nun mia vico.

Mi revenis jam antaŭ jaro el burĝa kazerno, sed ĉiuj travivaĵoj restis ĝis nun freŝaj en mia memoro. Longegajn 547 tagojn mi travivis kiel ĉeĥoslovaka soldato. Du el ili mi volas hodiaŭ prezenti al vi: unu tute ordinaran, kaj unu "iomete" eksterordinaran tagon.

I

Ordinara tago pasas jene: Je 5-a horo matene la soldatoj leviĝas kaj ĝis la 6-a ili sin vestas, faras ordon, matenmanĝas kaj pretigas sin al la tuttaga okupo. Je la 6-a komenciĝas "matena duonhoro". Nur en simpla uniformo, iam ankaŭ sen bluzo kaj ĉemizo, ili ekzercas sin, farante liber-ekzercojn laŭ la ekzemplo de suboficiro — antaŭ-ekzercanto. Per marŝo ili finas la "duonhoron" kaj preninte sian ekipon ili viciĝas. Kiam alvenas la rotestro, li tuj akceptas raporton. Soldatoj, kiuj transdonas kaj aliaj, kiuj akceptas tagdeĵoron, ceteraj, kiuj petas ion aŭ raportas ion, plie tiuj, kiuj plendas pri io kaj fine, kiuj estas ordonitaj al la "maldekstra flanko" de l' raportdonado. Ili ĉiuj vicordiĝis en unu simpla vico, kaj sinjoro kapitano nun iras de unu al alia akceptante raportojn. Plej longe li ĉiam haltas je fino de l' vico. Tie staras la "ribeluloj" kaj "kulpuloj". Sufiĉe longan tempon mi estis en kazerno, sed ne unufoje okazis, ke soldato estis juĝata prava. Ĉiam nur pravis superulo. Se ĉiuj soldatoj de tuta roto atestis, ke la plendanto diras la veron, ke la manĝaĵo estis nemanĝebla, kaj la deĵoranta oficiro diras: "Tio ne estas vero, mi gustumis tiun nutraĵon kaj ĝi estis bona", tiam la tuta roto devas silentegi, kaj la plendanto estas arestata.



Certe interesas vin, kiaj estas kutime la pekoj de "maldekstruloj". Tre diversaj: plej ofte estas "nesufiĉa konscio pri disciplino", kiu kaŭzas, ke soldatoj ne sufiĉe rapide, volonte kaj bone plenumas diversajn ordonojn, ke ili eĉ iafoje ekmalobeas al malbonaj, kriemaj suboficiroj. Krome ofte okazas, ke oficiroj ĉe kofro-vizito trovas en ĝi ne nur "malordon", sed ankaŭ malpermesitan literaturon kiel: "Komunista Manifesto", "Lenin pri milito", "Programo de bolŝevikoj", laboristaj ĵurnaloj ktp.

Iuj havas ekipaĵon aŭ armilojn malordigitajn, kaj al tiuj kaj similaj kulpuloj starantaj nun je "maldekstra flanko" promesas nun sinjoro kapitano, kriegante, severan punon. Je la 7-a la roto formarŝas al ekzercejo. Tie ĝis 11-a okazas kutima ekzercado, nomata de l' soldatoj per trafa termino "pelegado". Opiniante, ke multaj el vi ne kapablas sufiĉe klare imagi, kiel aspektas tiu "pelegado", mi ankoraŭ aldonas pli detale, ke la soldatoj dum tuta tempo, kiam la roto estas en ekzercejo, krom la mallonga ¼-hora paŭzo, preskaŭ ne haltas. El ĉiuj diversaj ekzercoj oni plej ofte faras la fundamentajn ekzercojn nomatajn "alsaltoj". Ekzemple oni diras: "Malamiko estas en tranĉeoj sur tiu monteto, 500 paŝojn antaŭ ni (kaj ni devas ĝin per atako forpeli aŭ venki, tial) per alsaltoj antaŭ-en!" Kaj je tiu "-en" leviĝas tuta vico da soldatoj, kuregas kvin, ok paŝojn kaj kiel fulmotrafite falas teren. Kuŝas kelkajn sekundojn, pafas du-tri fojojn kaj kuregas denove, ripetante la saman ekzercon. Kaj tiel senĉese . . . Kion intencas la estraro atingi per tia ekzercado? Tio estas klara. Por ke tiu amaso ne kaŝu, ne konservu, eĉ ne kolportu danĝerajn pensojn, por ke ĝi — la armeo — estu fidinda, ĝi devas esti, laŭ ilia opinio, esti fizike, korpe kaj sekve ankaŭ spirite tute elĉerpita. Kaj (ili supozas): ju pli granda elĉerpiteco, des pli granda fidindeco.

Revenante en la kazernon, la soldatoj devas laŭ ordono de l' rotestro kanti, sed lacigitaj ili havas humoron nek paroli unu kun alia, nek malfermi buŝon, tiom malpli kanti. "Ĉu vi ne kantos?" krias la estro. "Teren! Ŝovrampe antaŭen!" Kaj la laca roto ŝovrampas en koto aŭ ŝosea polvo antaŭen. Soldatoj montras, kiel ili "amegas" la patrion, kisante, ĉirkaŭprenante la teron — dum la rideganta oficiro diras al si "Dio, kiom mi estas potenca!" Ĉu estas mirinde, se la revenintaj soldatoj puriginte sian veston, ekipaĵon kaj armilojn, malgraŭ tio ke ili estas malsataj, ne havas apetiton, des pli, se la manĝaĵo tre ofte estas nemanĝebla? Vere ne.

Tagmezan paŭzon ili kutime tradormas. Antaŭ la 14-a komenciĝas denova okupo. Tute simila al la matena. Nur antaŭ la 17-a (kutime de la 16-a ĝis 16½-a estas lernado, kelkfoje ankaŭ la tutan posttagmezon. Tie en lernejo oni instruas pri "patrio", pri "eksteraj kaj internaj malamikoj", pri tio, ke "politiko absolute ne apartenas en armeon" (sed la soldatoj bone scias ekz. pri afero de generalo Gajda, eĉ scias pri tio tre bone el propraj spertoj); pri "bela historio de niaj legioj", pri "humaneco de Masarik" kaj eĉ pri venenaj gasoj ktp. . . . Pri kazerna lernado, pri ĝiaj metodoj, temoj, pri instruanto, eĉ aŭdantaro oni povus skribi tute memstaran artikolon. Je 16½-a ĝis 17-a estas denove ekzercado, plejparte ekzercoj kun pafilo kaj marŝoj. Post tio estas taga ordono. Tiu enhavas diversajn sciigojn, novaĵojn, eĉ malnovaĵojn. Ĝi komunikas, kiuj oficiroj morgaŭ havos deĵoron, kiu roto deĵoros, kian eventualan okupon pli eksterordinaran, ekz. pafadon, tuttagan marŝekzercon aŭ similan aferon oni planas por morgaŭ. Lasta ĉapitro de l' tagordono estas ĉiam plej ĝojiga: "Punitaj: soldato V. H. malrespektis ordonon de kaporalo X, 21 tagoj da severa aresto, soldato J. P. (ne kantis) pro sama peko, 14 tagoj, sold. K. L. havis kofron malordan (malpermesitan literaturon), 30 tagoj kazernkarcero; sold. A. V., F. N., J. P. (anstataŭ fari pentan vizaĝon) ĉe deva ŝovrampado donis malbelan ekzemplon ridante, ĉiu po 7 tagoj da severa aresto . . . kaj ankoraŭ aliaj kaj aliaj. Ne unu fojon okazis, ke en tagordono mankis "gojiga" lasta ĉapitro. Ne okazis, ke kazerna malliberejo estis vaka. Ĉiam iu "sidis".

Post tralego de la tagordono estas disdonata vespermanĝo. Post tiu la soldatoj denove purigas sian armilaron, veston kaj ekipaĵon, kaj fininte tiun laboron ili estas liberaj. Ĝis la 21-a ili povas promeni, viziti kinon ktp. Nur ili ne rajtas partopreni en laboristaj kunvenoj, viziti "laboristajn domojn" kaj klubojn, ne eĉ kiel ajn veni en pli proksiman kontakton kun civiluloj, interrilati kun ordinaraj laboristoj aŭ kamparanoj. Kiam en la kazerno ekmallumas (je 21-a horo), jam ĉiuj devas kuŝi por dormi. Ili kuŝas, sed ne dormas. Komjunuloj, kiel ĉie, kiel en ekzercejo, ĉe raporto, en lernejo, faras ankaŭ nun sian taskon. Komenciĝas parolo, kaj longe ĝis nokto ĉiuj ĉambranoj priparolas tagajn travivaĵojn. Ĉiu soldato kalkulas, kiom da tagoj ankoraŭ li estos en kazerno, kiu ankoraŭ okazos al li antaŭ fino de sia militservo. Kaj ĉiam la komjunuloj konkludas: "K-doj, memoru, ke la venonta milito ne estos milito inter du aŭ pli da nacioj, sed la finlukto de du klasoj, kaj ni apartenas al proleta, niaj oficiroj al la burĝa klaso. Ili donis al ni pafilojn, ni devas ilin uzi kontraŭ niaj klasaj malamikoj (kiel diris Lenin)." Per tiaj fajreroj finiĝas ordinara tago. (Finota.)

J. Vakulinĉuk (10032).

Krom infanvartejo la komunumo havas lernejon, bibliotekon kaj anguleton de Lenin kun gazetoj kaj libroj. Unuvorte, la komunumo, disvolviĝante, fariĝas vera agrikultura oazo, kiu plibonigante sian mastrumadon, influas ankaŭ samdirekte sur la ĉirkaŭan loĝantaron. Nino Sulje (Narovatkina).

TRA ESPERANTIO

EKSTER NI

— Ĉu vere la sennaciuloj celas detrui la naciajn lingvojn?! Estus granda, nepardonebla krimo. Mi apenaŭ povas kredi, ke homoj, kiuj ne sidas en frenezulejo, povas celi pereigi tiajn trezorojn . . .

— Vi estas tamen ĝuste informita, sinjoro. Fakte la sennaciuloj plenkonscie celas la formalaperon de la naciaj lingvoj . . .

— !!! ??

— Kvietiĝu, mi petas. La sennaciuloj frenezaj ne estas. Cetere ne dependas de ilia volo, ĉu esperanto pereigos aŭ ne la de vi tiom ŝatatajn trezorojn. Sed permesu unu demandon. Ĉu vi opinias, ke esperanto estas, aŭ almenaŭ povas fariĝi literatura lingvo? Ĉu la tradukoj el la literaturaj ĉefverkoj, kiujn faris Zamenhof kaj aliaj talentaj esperantistoj, bone spegulas kaj komprenigas la originalojn?

— Mi opinias, ke jes . . .

— Nu, ĉu sekve estus granda domaĝo, se la venontaj generacioj konatiĝus kun Ŝekspir, Volter, Cervantes, Dante, Geŭte k. a. klasikaj majstroj nur pere de esperanto? Nuntempe la granda plimulto da kleruloj konas la verkojn de Homer, Virgil kaj de ĉiuj antikvuloj nur pere de nacilingvaj tradukoj. Tre malmulte da fakuloj ja kapablas legi antikvajn aŭtorojn en originala teksto.

La sennaciuloj havas la firman kredon, ke la nacilingvoj mortos kiel mortis la lingvoj de malaperintaj civilizoj. Sed ili ne intencas bruligi bibliotekojn. Nur naciuloj kapablas tion fari dum militoj. Sekve ĉu decas ĝemkriadi, ke la sennaciuloj volas pereigi trezorojn? . . .

Se esperanto estas taŭga esprimilo por scienco, por tekniko, por literaturo, ĝi pli malpli frue sin trudos al la granda publiko tra la tuta mondo. Kaj sekve de tio estas evidente, ke ĝi fariĝos la ĉefa kaj eĉ finfine la sola kulturlingvo; estas al ni klare, ke la nuntempaj kulturlingvoj fariĝos arĥaikaj kiel la lingvoj sanskrita, greka, latina. La naciuloj tion malhelpi ne povos.

Se vi bone pripensas la aferon, vi alvenos al la konkludo, ke ne la sennaciuloj devus sidi en frenezulejo, sed ĝuste tiuj esperantistoj, kiuj ne antaŭvidas la konsekvencojn de sia fervoro por nia "kara lingvo". Al ili oni ĝuste povas rilatigi la latinan proverbon: Quos vult Jupiter perdere, dementat prius. *E. L.*

SAT-anoj

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

Vivo, movado

Mi skribas el lando, en kiu la proletoj vivas en teruraj kondiĉoj. En tiu situacio ĉiuj, kiuj nur iomete povas pensi, vidas la klasan diferencon, la kapitalisman produktsistemon kaj ĝian kulturon. Por pripensigi ĉiujn K-dojn, mi volas citi simple kelkajn harstarigajn aferojn. —

Unue: 21-jara virino en alumetfabriko, kiu depost 7 jaroj laboras, ricevis post 40-hora laboro 6 pengojn kaj kelkajn fillerojn (t. e. 3½ mk. g.). Kiel ŝi vivu? Tiel kiel la bestoj. Aŭ ŝi devas post la laboro doni sian korpon al iu sinjoro. Alia afero: Tie, kie la polico persekutadas la laboristan movadon, kie eĉ ne estas eble amase ekskursi al iu loko, tie en laborista gazeto aperas anonco de la plej famaj alkoholkapitalistoj. Tiu bilda anonco montras tri famajn laboristajn gvidantojn, kiuj laŭdas la bierbotelojn. Kie estas la klasbatalo, la proleta kulturo? Alia afero: Oni preparas ekspozicion. Dum la tuta nokto ni laboregas. Sufiĉe bone ni kunmetis la materialon. Frumatene venas sekretpolicistoj kaj konfiskas kvar kontraŭmilitajn bildojn. Poste la ĝendarmo ne permesas en la provinco funkciigi esperantajn grupojn, eĉ kursojn. Ĉiupaŝe oni sentas la subpremon. Tiam aperas laborista esperanta kantlibro plena de popolkantoj militendencaj kaj naciismaj. Ĉu ni lernu esperanton, por poste konatiĝi kun tiaj libroj? Ni devas forigi el nia movado tiaspecajn aferojn.

Ankoraŭ unu afero: Dum la ekspozicio venas multaj proletaj vizitantoj, inter ili ĵurnalisto de laborista gazeto. Kelkaj ekkonas lin, tuj lin kaptas kaj klarigas al li la ekspozician materialon. Kiam ni montras al li kelkajn SAT-librojn kaj parolas pri la signifo de SAT, tiam li respondas: "Ne estas eble atingi sennaciecon, ĉar mi ankaŭ kaj ĉiuj hungaroj sentas, ke ili estas hungarlandanoj, kiel la germanoj diras: Ni estas germanoj. Ni havas la naciajn sentojn. Kiu eltrovis la sennaciismon, tiu persono nepre estas frenezulo."

Tiel aspekas laborista ĵurnalisto, kiu eĉ ne havas komprenon pri la signifo de naciismo. Ĉiuj povas imagi, kiel estas redaktataj tiaj l a b o r i s t a j g a z e t o j.

Mi citis tiujn aferojn, por ke la proletoj pensu racie kaj en aliaj landoj ne okazu similaj aferoj. Ni devas senlace labori por korekti tiajn erarojn kaj montri klare la vojon, sur kiu ni povas proksimiĝi al nia celo.

P e n s e m a s.

EL NIA LETERARO

Kaŭze de la Tolstoj-artikolo en n-o 207 ni ricevis sekvantan tre interesan leteron, kiu tipe montras spiritostaton, pri kiu oni povas havi diversajn opiniojn:

"Je la memoro de grafo Leo Tolstoj. Pasis jam cent jaroj de kiam oni memoras pri grafo L. Tolstoj. Ni ekrigardu pli proksime, kiu estis li por gelaboristaro. Li estis burĝo, absoluta burĝo. Li kunsentis kun burĝoj kaj juĝis laboran klason ĉiam laŭ burĝa metodo. Iun laboristan doktrinon li ne agnoskis, sekve li agnoskis nur burĝismon, sed por ke sufiĉu por kiu verki, li eluzis suferojn de geproletoj por profito al si. Ĉu indas ke geproletoj memorigas kaj famigas lin? Sovetianoj despli. Ne povas esti, ke efektive li indas tion. En junaĝo, eksciante pri fama verkisto (antaŭ milito), mi akiris ekstraktajn broŝurojn el verkoj de l' grafo. Mi legis, sed neniun famon trovis en ĝi. Relegante same mi ne trovis famecon en ĝi. Mi tamen daŭrigis pensi ke li estas fama, ĉar ĉiuj ja lin laŭdis. Tuj mi rememorinte komprenis ke li estis burĝo kaj burĝoj lin laŭdis. Ĉu sovetianoj efektive tuj tiel pensas kaj laŭdas paraziton, sangosuĉanton de geproletoj? Lian intelekton li akiris je konto de laboristoj, ilin artifikis, kaj ankoraŭ samon li faras post morto. Li ja helpis al burĝoj militi, ekspluati laboristojn, buĉi, por kiu li uzis sian intelekton; eĉ liaj verkoj tuj daŭrigas fari samon. K-doj, kie kaŝiĝis nia konscienco? — Enpresi petas:

N. B a l o d i s (7714)."

——«o»——

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

SOVETIO. Leningrado. Dum periodo okt. ĝis marto 27/28 nia laboro rezultigis jenon: estis organizitaj 39 raportoj, kiujn aŭskultis — 4950 pers., precipe gelaboristoj; funkciis — 61 rondetoj kun — 900 partopr., — 25 rondetoj el ili estis pripagataj (meze 3 rubl. por unu leciono) aŭ 24—30 rubl. monate); laŭ satistiko, tiam sufiĉe malbone organizita kaj pro tio ne tre kompleta, estis sendataj eksterlanden — 1120 let. k ricevataj — 920 let. La koresp. tuŝis — 150 urbojn el 40 landoj; kune kun VOKS (Tutrusia Societo por kulturligo kun eksterl.) estis invitataj por Oktobraj festoj 15 lab. esp-istoj el div. landôj, krom tio nin vizitis 11 K-doj (el Anglio, Hungario, Svedio, Germ. k Jap.), kiuj elpaŝis dum kunvenoj en div. fabrikoj; ĉe ĉiuj urbaj distr.-kom. de IRH estis organizataj esp. konsultejoj, pere de kiuj estis transdonataj al ĉeloj — 40 let. el eksterl. de IRH-ĉeloj k politik-malliberigitoj. Ruvinskij.

——«o»——

Nova sukceso en Francio

La Federacia Kongreso de Junaj Socialistoj de la Sen (france: Seine)-departemento, kiu okazis 30 sept. en Montrej' (france: Montreuil), akceptis principe la devigan studadon de esperanto.

Laboristoj kaj Esperanto

Dum la Kongreso de "Internacio de Socialista Kunbatalo (ISK)", kiu okazis en Germanio, meze de aŭgusto, oni aŭdis, ĉe oficiala raporto, la sekvantajn vortojn: "Mi opinias, ke vera laborista Internacio, kiu ne estas Internacio de oficistoj, sed Internacio de laboristoj, estos nur tiam ebla, kiam la batalanta Laboristaro parolas u n u lingvon. Laŭ la nunaj cirkonstancoj, tiu lingvo povas esti nur e s p e r a n t o."



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado 1928. Eld. UEA, 12 Bould. du Théâtre, Genève. Por membroj de UEA. Form. 11½×16 cm. 608 pĝ. — Kiel la SAT-jarlibroj, ankaŭ tiuj de la neŭtrala movado tendencas ĉiujare pligrandiĝi. Sed oni devas konsideri, ke en la UEA-jarlibro anoncoj k sufiĉe ampleksa enciklopedia parto okupas multe da spaco k dikigas la libron. La adresaro mem troviĝas sur la paĝoj 225—600 k estas beligita per fotoj de urboj k pejzaĝoj. Bedaŭrinde ne estas eble taksi la progreson de la movado, ĉar mankas statistikaj tabeloj, kiuj resumas la adresaron. Estus trompe laŭ la amplekso de l' libro fari konkludojn pri la kresko de la movado. Ĉar laŭ la antaŭparolo de s-ro Jakob, la Direktoro de UEA, oni klopodas evoluigi laŭeble el la jarlibro veran internacian "Vademecum" (enciklopedian konsilon). Tio kompreneble kondiĉas eksterordinaran amplekson. Eble turistoj k vojaĝistoj ŝatas tian aranĝon. N. B.

Revuo Kultura, organo de Esp. Kultura Asocio, n-o 1, aŭg. 1928, Tokio. Adm. Junko Sibata, 1870, Kinuta-Okura, Kitatama, Tokio. 30-paĝa nova gazeto malgrandformata kun scienceca enhavo. Lingvo k stilo bonaj. Unu artikolo okupas sin pri la aprila kajero de "SR" (scienca serio) en kritika formo laŭ proleta vidpunkto. Ni bedaŭras, ke tiuj studentoj-eldonantoj ne kunlaboras ĉe nia Revuo anstataŭ eldoni novan gazeteton. Samformata, sed pli malampleksa estas kajero n-o 1 (aprilo 1928) de revueto **Psiko,** eldonita de la samaj personoj; enhavo: unu sola artik. pri psikologio. La japanaj esp-istoj ne dissplitigu siajn eldonfortojn, kiel nun okazas — certe ne por utilo de la movado. N. B.

Foiro de Frankfurt a. M. Aŭtuna foiro 1928. La foira oficejo eldonis, kiel kutime, ankaŭ por tiu ĉi foiro esp. lingvan prospekton per sia Esp. Fako. Ĉi lasta alvokas reklami per esp-o por la foiro en la gazetaro.

Literatura Informilo, eld. de Esp. Fako ĉe eldonejo F. Hirt & Sohn, Leipzig, n-o 5. 16 paĝoj da priliteraturaj artikoloj kun specialaj atentigoj pri la verkoj aperigitaj de tiu konata eldonejo.

Die Weltsprache (La mondlingvo), Wien, n-o 1, sept. 1928. Gazetservo k Informilo de l' Ligo de Esp. Amikoj. Adr.: Wien, Postamt 34. Por la Liganoj senpaga. Minimuma jarkotizo 1 mk. g. — S-ro E. Pfeffer, kiu kreis, organizis k eldonis jam tiom multon en la esp. movado, prezentas al ni germanlingvan propagandilon en formo de gazeto (formato k amplekso de "S-ulo"). Samtempe ni sciiĝas, ke li kreis Ligon de Esp. Amikoj (neŭtralan kompreneble), kiu unuigu en laborkomuneco aktivajn esp-istojn k "amikojn de l' esp. movado". Valore estas, ke la gazeto estas sendata kiel gazet-informilo al 3000 germ. gazetoj, lernejestraroj k kultur-organizoj.

Petit Vocabulaire de termes diplomatiques. Eld. de l' Esp. Akademio. Diplomataj terminoj en franca, germ., angla, itala, esperanta lingvoj.

L' Initiation à l' Esperanto de M. Rollet de l' Isle. Eldonejo: Belga Esp.-Instituto, 11, rue du Petit-Chien, Antverpeno.

NE SENDU TRO LONGAJN ARTIKOLOJN!
VERKU KONCIZE!

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Edasi, Tallinn, 15. 9., Faŝisma kult. (201); Le Matérialiste, Bruselo, sept., En lando de Kristo (204); De Kommunist, Bruselo, 19. 5., Por la juna Sacco, 30. 6., Instrua okazaĵo (190), 28. 7., El Argentino (195), 29. 8., El Argent. (201); Munkas, Bratisl., 7. 5., Sknemvar, 20. 6., Sur novaj vojoj; Juna Teksisto, Ivanovo-Vozn., n-o 75, Infansklaveco en Persio, Bezboĵnik, Moskvo, n-o 38, Letero el Palestino, n-o 36, rim. pri esp-o k liberpens.

Represis el "S. R.":

Munkas (laboristo), Bratisl., 15. 5., Du francaj forkur., 1. 8. Ree juna, 8. 8., Mi vin ne laŭdas, Uj Elöre (Nova antaŭen), N. Jorko, 19. 8., Multatuli, 28. 8., Agitisto Ĥismetov, 1. 9., Ankaŭ ili estis por anark.

Represis el "La Lern.":

Munkas, Bratisl., 23. 8., Ridanta Lenin, Uj Elöre, N. Jorko, 28. 8., Rid. Lenin.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

ITF-Bult., Amsterdamo, sept., The Plebs, Lond., sept./okt., Daily Herald, Lond., 21. 9., Signalen, Stokh., 20. 9., D. Deutsche Eisenb., Berlin, 16. 9., Sächs. Arb.-Ztg., Leipz., 15. 9., Informa bult. de VOKS, Moskvo, n-o 34/35 (res. en esp-o); Ruhr-Echo, Essen, 18. 9. (esp. ang.), Munkas, Bratisl., 18. 8., 19. 8., Krasnoje Znamja, Krasnodar, 25. 5., 1. 9., Daily Herald, Lond., 28. 9., The Shop Assistant, Lond., 22. 9., Violet, Hilversum, 28. 9., Signalen, Stokholmo, 27. 9. (rubr.), Travail, Lyon, 29. 9., D. Deutsche Eisenbahner, Berlin 23. 9., 30. 9., Leningr. Pravda, Leningrad, 21. 9., Le Populaire, Paris, 2. 10., Las Noticias, Barcelona, 23. 9.

Peresper. artik. k leterojn presis:

Sächs. Arb.-Ztg., Leipzig, 21. 9., 22. 9. (art. de Nekrasov); Le Matérialiste, Bruselo, sept., Travail (laboro), Lyon, 22. 9., Munkas, Bratisl., 2. 6., Krasnoje Znamja, Krasnodar, 5. 5., 16. 8., 2. 9.

Pri SAT-Kongreso:

AIZ, Berlin, n-o 39, bildo de l' SAT-kongr.

Korekto. En n-o 209 legu pĝ. 2, 2-a kol., 7-a linio de malsupre, 1 miliardo anst. 4. Tiom homloĝata la tero ja ne estas!

KONTRAŬ LA MILITON!
Nia grupo aranĝos esp.-pacif. ekspozicion. Ni petas ĉiul. Gek-dojn sendi al ni simpatiajn salutkartojn k leterojn. Adr.: K-do Adolf Hecht, Friedländerstr. 29, **Zittau i. Sa.**

Internacian Letervesperon
aranĝas Esperantoklubo "La Aglo", Göteborg, la I-an de decembro. Sendu leterojn kaj poŝtkartojn. Adresu al: prez. Elma Adamson, Nordhemsgatan 45, Göteborg, Svedio, por "La Aglo".

KAMARADOJ EL ĈIUJ LANDOJ!
Por montri, ke esperanto estas pli disvastigita ol ido, sendu multnombre leterojn al Saratovaj Kursoj por fremdaj lingvoj kaj proponu enkonduki ĉe la Kursoj esperantan fakon. Estas dezirindaj leteroj de privatuloj kaj precipe de organizoj proletaj! — La adr.: **Saratov,** USSR, Kursi Inostrannih Jazikov, Nikolskaja ul, protiv Sovetskoj, Peranto M. Segal (127).



Ĉu vi jam konas la plej **bonkvalitan klingon**

ESPERO?

Ĝi posedas **eksterordinaran tranĉkapablon.** Ĉiu friĝu **revendisto!**

—o—

Al ĉi lastaj mi liveras afrankite **1000 klingojn** por **54.— mk. germ.**

A. Reul,
Würselen b. Aachen, Germanio

Eldonaĵoj de Internacia Socia Revuo ATENTU! ATENTU!

Kiel estas konate ekzistis antaŭ la milito esperanta socialista organo **"Internacia Socia Revuo".** La administracio de ISR ankaŭ aperigis serion da eldonaĵoj en esperanto. Ĉi tiuj eldonaĵoj nun estas aĉeteblaj ĉe la Adm. de SAT, je tre malaltaj prezoj. Ĉiuj broŝuretoj eĉ havas historian valoron en la esp. movado.

Malmultekosta literaturo — Inkluzive afrankon!

	Prezo:
Pri la esenco de konstitucio, parolado de F. Lassalle, 30 pĝ.	**0,20** mk. g.
La piramido de tiranio, de F. D. Nieuwenhuis, 32 pĝ. . .	**0,20** „ „
La reforma mono de Silvio Gesell, parte orig., 48 pĝ. . .	**0,25** „ „
Por ataki kaj defendi, parolado de W. Liebknecht, 32 pĝ. .	**0,20** „ „
La salajro, de P. Kropotkin, 22 pĝ.	**0,15** „ „
La mizeruloj (I), de Victor Hugo (fama verko), 248 pĝ. . .	**1,20** „ „
La forto de la fortaj, de Jack London, 20 pĝ.	**0,15** „ „

Krome ni posedas ankoraŭ malgrandan kvanton da:

Krimoj de dio, de S. Faure, 32 pĝ. . . . . prezo: **0,20** mk. g.

Eluzu la okazon! **Tuj mendu!**

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

NIA POŜTO

3409. — En okazo de bezono ni uzos. Ni ĉiam preferas originalojn.

5135. — Via rap. estas iom longa. Sed ĉar ĝi estas interesa, ni uzos, tuj kiam la loko permesas.

Bulgarano. — Ĉar ni enmetas tutan artikolserion pri Bulg., vi komprenas, ke ni ne povas promesi al vi uzi vian art. Sed de tempo al tempo ni ŝatas ricevi viajn informojn.

3189. — Loko mankas. Ni preferas originalojn.

11 220. — Via koop. artik. estas uzinda, sed ni ĝis nun ne povas enmeti pro manko de loko.

5966. — Via artikoleto kompreneble estas tre plaĉa, sed ĝi estas al ni tro laŭda por esti publikigebla en "S-ulo". Nur en okazo de iu jubilea n-o ni povas enmeti tian materialon.

10 512. — En okazo de bezono ni uzos, sed sen bildoj. Ĉi lastajn ni resendos nur kontraŭ pago de l' afranko.

5981. — Via interesa artik. estas prokrastita, sed certe aperos, kiam loko permesos.

12 448. — Vi povas sendi al ni monon, ĉu en germ. valuto, ĉu en portugala, tute indiferente.

Landau. — Ni persone ne sendas provekz. de "La Informa Bulteno". Ni peris vian peton al Moskvo.

5436. — Jes ni ricevis 3 foje mendojn al plena vortaro.

77. — Jes la 5 ekz. estas via rekompenco.

I. gr. de HESL. — Bildojn, fotojn ktp. ni ne havas.

Adm.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

BELGIO

— K-doj el ĉ. l. sendu PM al K-do René Lecarme, Rue Large, Comblain-au-Pont. Tuj resp.

BULGARIO

Fraŭlo Ivan Valjaviĉarov, str. "Nikolaeva", 29, Samokov, dez. koresp. kĉl., L, PI.

K-do Mair Aŝerof, str. "Izvorna", 15, Plovdiv, dez. koresp. kun gesamideanoj el ĉ. l., L, PK, PI. Ĉiam resp.

GERMANIO

K-do Max Paul, Markt 209, Strehla a. E., dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L, PI. Resp. certe.

K-do Paul Noack, Bicusdorf 10, poŝto Weesenstein i. Sa., dez. interŝ. PM, kĉl. Por ŝpari afrankon mi petas alsendi ne malpli ol 25 pecojn. La saman kvanton mi resendos.

K-do Kurt Schöne, Schillerstr. 73, Radeberg i. Sa., dez. koresp. kĉl. Resp. garant.

K-do Willi Gross, Plauensche Strasse 1, Werdau i. Sa., dez. koresp. pri sportmovado k a temoj, L. Ĉiam resp.

K-do Friedrich Perles (jurstudento), Hint. Vorstadt, 42/43, Königsberg 5 (Pr.), dez. koresp., pref. kun Sovetio, Litovio, Latvio, Portugalio, Balkano, ekstera Eŭropo, L, PK, PI, PM. Resp. garantiata.

K-do A. Liebs (tramisto), Bautzner Str. 129, Dresden-N. 6, dez. interŝ. L, PI kun tramistoj de la tuta mondo pri nia fako. Resp. garantiata.

K-do Rud. Müller (tramisto), Struvestr. 36, r., Dresden-A. 3, dez. koresp. kun K-doj el eksterl. grandurboj. Mi kolektas trambiletojn, precipe interŝ. fakdemandojn. Sendas rekompence laŭ interkonsento a. kolektaĵojn. Certe resp.

HUNGARIO

K-do Ladislaŭo Spierer, IX. Ulläi-ut. 53, Budapest, dez. interŝ. nur esp. gaz. Sendu multe k amase. Certe k tuj resp.

K-do Vilhelmo Bleier sciigas siajn amikojn k koresp-antojn, ke lia nova adreso estas: Budapest, VII. Garai-u. 37, I. 4.

JUGOSLAVIO

K-do Luka Jeviĉ, Terazije, 7, Beograd, dez. koresp. kĉl., PI.

K-dino Nadeĵda Lazareviĉeva, Splitska, 27, Beograd, dez. koresp. kun junularaj K-dinoj el ĉ. l. PI.

SOVETIO

K-do Aleksandro Kalaŝnikov (studento), Gotmanovskaja, 9, kv. 9, Niĵni-Novgorod, dez. koresp. kĉl., L, PI, bfl., precipe kun Oriento k Ameriko, ĉiuj ricevos resp.

K-do Kulagin, Kuzneĉnij, 3, Bogorodsk, Niĵegor. gub., dez. koresp. kĉl., L, PK, PI.

— Grupo de kooperat. oficistoj dez. koresp. kĉl., L, PK. Adr.: K-do Kulagin, Rajkustsojuz, Bogorodsk, Niĵegor. gub.

Adresŝanĝo. — K-dino Pimenova, Elĥovka, Samarskoj oblasti i okruga, domo de Jakuŝin (ant. Samara, Orenburgskaja, 74).

Adresŝanĝo. — K-do Kastja Panjŝin, Tovarnaja Baza Uraloblsojuza, N.-Tagil (stratŝanĝo). Korektu en Jarlibro.

— La komjunula ĉelo de konstrulaboristoj dez. koresp. Adr.: Moskvo, ul. Fridrika Adlera, 41 ij komitet stroit-raboĉik, al Jaĉejka komsomola.

SVEDIO

— Esperanto-studrondo de Nynäshamn, dez. serioze koresp. kĉl. gek-doj, pri ĉ. temoj. Adr.: K-do Gustav Hägg, Brunsgatan, 3, Nynäshamn, (SAT-ano 606).

Fervojistoj

en 'S-ulo' n-o 185 relegu pri 'Nia klubo'. Ni, SAT-anoj, provu fari la familivesperojn internaciaj. Sendu por la vesperoj laŭdeziran materialon de viafakaj fervojistoj: salutleterojn, priskribojn de via studo, vivo, laboro, tekniko ktp. Ne nur seriozaĵojn, ankaŭ humoraĵojn. La vesperoj estas laŭfakaj k. amasaj (neesperantistaj.) Ni respondos. Adresu: USSR, Samara, strato de Leo Tolstoj, 94, ĵeldor klub, SAT-grupo.

ĉiufakaj

GELABORISTOJ! KOMJUNULOJ! JUNPIONIROJ!

Laboristoj de alkohol-branda fabriko volegas aranĝi regulan korespondadon kun Gek-doj el ĉ. l.; skribu kolektive aŭ individue. Virina, komjunula, junpionira fakoj ekzistas. Resp. garantias SAT-ano 11 944. Skribu multnombre! Adr.: USSR, **Voroneĵ,** Kolcovskaja 1, Sprito-vodoĉn. zavod, Zavkom. (Esp.-fako).

ATENTU!

Kiuj eksterlandaj K-doj venos sekvontan jaron al Nürnberg, kie okazos la asocia festo de la germana Laborista Gimnast- k Sport-Asocio? Informojn petas K-do Gustav Küster, Altenweg 1, **Bremen** (Germanio).

SENDIULOJ, LIBERPENSULOJ

okaze de l' kristnasko sendu abunde kontraŭreligiajn leterojn por kompletigi niajn amasajn paroladojn. Ni faros la samon.

Adr.: USSR, **Samara,** strato de Leo Tolstoj, 94, ĵeldor klub, SAT-grupo.

SAT-ANOJ EL JUGOSLAVIO!

Saratovaj junkomunistoj interesiĝas pri vivo kaj laboro de Junlaboristaj Organizoj (precipe de junkomunistoj) en via lando. Skribu mem kaj peru kolektivan koresp-adon inter viaj junulaj organizoj kaj la junkom-istoj saratovaj! Leteroj estu sendataj laŭ la adr.:

Saratov, USSR, Kamiŝinskaja 155, al M. Segal (127).

ATENTU!

SEU-Ĉelo ĉe telefon-fabriko je nomo de Lenin aranĝas okaze de 11-jara jubileo de Oktobra Revolucio specialan anguleton por internacia esp. korespondaĵaro k IRH-propagando. Gek-doj el ĉ. l. helpu al triumfo de esp. k IRH-movadoj en nia loko. Sendu L, PK, ĵurn., gaz., afiŝojn ktp. Ĉiu nepre ricevos resp.

Nia adr.: USSR, **Niĵni-Novgorod,** Miza, Telefon. Zavod, al Esperanto-Grupo.

Komencanta grupo laborista de hufumnajla laborejo volas korespondi kĉl, interŝanĝi ilustr. gazetojn, ĵurnalojn ktp. La respondon garantias **P. Tilin** (9310). USSR, **Leningrad,** Vas. Ostr. 17 linia, 52/54, al esperantista grupo.

SAT-ANOJ ATENTU!

La 4-an de nov. nia grupo aranĝos sian unuan propagandan vesperon. Tial ni petas vin sendi al ni PK, salutleterojn, esp-aĵojn kaj propagandmaterialon. Ĉiu ricevos respondon.

Adr. al: K-dino D. Crosbie, 12 Chesser Ave., **Edinburgh,** Britio.

ENHAVO:

	pago
Tial mi ne povas kredi je dio	17
Konflikto en Jugoslavio	18—19
Iom pri la kooperativa movado en Svedio	19
Raportaro	20
La komunumo je nomo de Roza Luksemburg	20—21
Du tagoj el vivo de burĝ-armeano	21
Tra Esperantio	22—24
Anoncoj, Korespondado	23—24

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)